XXXIV ORDINARA TEMPO – 21-an de novembro 2010

„Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno.“

Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 23,35-43

En tiu tempo, kiam oni krucumis Jesuon, la popolo staris kaj rigardis, la regantoj de la popolo mokis Jesuon kaj diris: „Li savis aliajn; nun Li savu sin mem, se Li estas vere la Mesio, la elektito de Dio!“

Ankaŭ la soldatoj primokis Lin; ili alproksimiĝis al Li kaj prezentis al Li vinagron, dirante: „Se vi vere estas la reĝo de la Judoj, savu Vin mem!“ Super la kapo de Jesuo ili pendigis skribaĵon kun la vortoj: „Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj.“

Kaj unu el la pendigitaj krimuloj insultis Lin dirante: „Ĉu Vi ne estas la Mesio? Savu Vin mem kaj nin!“ Sed la alia intervenis riproĉante lin, kaj diris: „Ĉu vi ne timas Dion, dum vi troviĝas en la sama kondamno? Ni ricevis juste punon pro niaj faroj; sed Li faris nenion malbonan.“ Poste li aldonis: „Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno.“ Jesuo respondis al li: „Vere Mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo.“

La hodiaŭan pecon ni povas difini la lastan tenton de Jesuo. Jesuo en la dezerto estis tentata de la diablo, de Satano, tentoj kiuj estis ankaŭ delogoj. Satano ne proponadis sin kiel rivalon, kiel malamikon de Jesuo, sed kiel valoran helpanton.

Li proponadis utiligi liajn kapablojn de filo de Dio por savi sin mem, por havi la povon kaj, precipe, por esti akceptata kaj rekonata de la homoj. Kaj Jesuo rifuzis. Nu la tentoj en la evangelio de Luko finiĝas per sibila frazo; skribas la evangeliisto ke “La diablo malproksimiĝis de li por reveni je la fiksita tempo”, pli bone tion traduki per “je la oportuna tempo”, aŭ “je favora okazo”.

Fakte li uzas la grekan vorton Kairos kiu signifas ne maltrafendan okazon. Nu ĉi tiu estas la okazo en kiu la diablo denove prezentiĝas. Ni vidu. Skribas la evangeliisto “la popolo staris kaj rigardis”.

Ne temas pri pasiva rigardado, estas la popolo mem kiu, seniluziigita de Jesuo kiu ne estas la mesio atendata de la tradicio, la filo de Davido, kiu volis rekonkeri la regnon. Ĝi

lin rifuzis kaj estas la popolo kiu petis ke tiu Jesuo estu krucumota. Do tiu stari kaj rigardi flanke de la popolo, ne estas pasiva, sed estas aktiva.

"La regantoj de la popolo mokis Jesuon kaj diris: „Li savis aliajn; nun Li savu sin mem,". Jen revenas, kaj estos tri fojojn ripetataj, la tentoj de la dezerto, kiam la diablo diradis "Se vi estas la filo de Dio". "Se Li estas vere la Mesio, la elektito de Dio!" Do la estroj primokas Jesuon, lin priridas kaj estas la instrumentoj de Satano kiuj invitas Jesuon, kiu estas la filo de Dio, utiligi siajn kapablojn kaj sian povon por savi sin mem.

Sed Jesuo ĉiujn siajn kapablojn kaj sian povon ne uzis por savi sin mem, sed por savi la aliajn. Kaj ili lin primokas: "La elektito de Dio!", kiu estas forlasita. "Ankaŭ la soldatoj primokis Lin". Jesuo havas ĉiujn kontraŭ si: la popolon, la ĉefojn, la soldatojn. "Ili alproksimiĝis al Li kaj prezentis al Li vinagron" dum la vino en la Biblio estas simbolo de amo, la vinagro, ĝia kontraŭo, estas simbolo de malamo. Do ili montras sian tutan malamon kaj diradis ankaŭ ili, samkiel la diablo kaj samkiel la ĉefoj. "Se vi vere estas la reĝo de la Judoj, savu Vin mem!
Do ili denove lin defias, estas la satana tento utiligi liajn kapablojn je propra avantaĝo. "Super la kapo de Jesuo ili pendigis skribaĵon" primoka skribaĵo: „Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj." laŭvorte "La reĝo de la Judoj estas tiu ĉi".
Temas do pri tre malestimiga, tre pririda skribaĵo, "Rigardu kian finon faris la reĝo de la Judoj". Nu, Jesuo estas insultata, primokata de ĉiuj, de la popolo, de la ĉefoj, de la soldatoj, kaj eĉ de la krimuloj kun li krucumitaj. "Unu el la pendigitaj krimuloj insultis Lin dirante: „Ĉu Vi ne estas la Mesio? Savu Vin mem!"

Jen por la tria kaj definitiva fojo – la nombro tri en la hebrea simboliko signifas tion kio estas definitiva, tion kio estas plena, tion kio estas kompleta, revenas la lasta ekstrema tento. Ĉu vi estas la filo de Dio? Ĉu vi estas la mesio? Utiligu viajn kapablojn por savi vin mem. Sed Jesuo sian kapablon utiligis por savi la aliajn.
Revenas do la ekstrema tento de la diablo. "Savu Vin mem kaj nin! Sed la alia intervenis riproĉante lin, kaj diris: „Ĉu vi ne timas Dion, dum vi troviĝas en la sama kondamno?" La fakto ke Jesuo estis kondamnita kun iuj krimuloj signifas ke ankaŭ li estas konsiderata danĝerulo. La kruco estis la kondamno rezervita al la feĉo de la socio, ĝuste al la personoj kiuj faris la plej gravajn krimojn.
Kaj do Jesuo estas kunigita al tiaj personoj. "Ni ricevis juste" fakte la kruco estis torturo pro la plej teruraj krimoj, "ĉar ni ricevas punon pro niaj faroj; sed Li faris nenion malbonan."
Ĉi tie Luko antaŭigas tion kion li poste metos en la buŝon de Petro en la Agoj de la Apostoloj kiel sintezon de la ekzisto de Jesuo. Ĝi estas tre bela esprimo kiu troviĝas en la Agoj kie Petro diras ke "Jesuo de Nazareth, kiu psais beatigante kaj resanigante ĉiujn tiujn kiuj estis sub la rego de la diablo ĉar Dio estis kun li". Ĉio ti estis koncentrita en tiu "li faris nenion malbonan", difino pri Jesuo.

Nu al Jesuo sin adresas unu fripono, unu krimulo, versajne la persono konsiderata kiel eble plej malproksima de Dio, la plej flankenmetita de Dio, kiu havas nek meritojn, nek virtojn proponindajn. "Tiu" kaj tamen li sin adresas al Jesuo kaj diras al lio."memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno."
La persono plej fora de Dio estas la ununura kiu rekonas Jesuon kiel reĝon kaj petas esti memorigata en lia regno. Nu Jesuo faras multon pli ol tio kion oni povas imagi kaj revi. Jesuo ne memoras pri li, sed lin portas kun si. La bildo de Jesuo kiu estas nun prezentata

al ni estas samkiel tiu de paŝtisto kiu serĉas kaj trovas la perditan ŝafon kaj poste transdonas al ĝi sian forton mem kaj ĝin metas sur siajn ŝultrojn.

Fakte Jesuo respondas al li “Vere” temas do pri solena aserto, “mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo”. Jesuo do ne memoros lin en paradizo, sed hodiaŭ lin portas, ĉar la dio kiu manifestiĝas en Jesuo ne estas la Dio kiu rigardas la meritojn, li estas bandito, krimulo, havas neniun meriton, ne estas iu Dio kiu rigardas la virtojn, li ne havas ajnan virton, sed estas la Dio kiu rigardas la bezonojn kaj la necesojn, iu Patro kiu sian amon disponigas nel kiel premion sed kiel donacon, tiel kiel Jesuo faras.

La unua persono kiu kun Jesuo eniras en la regnon de Dio, en la regnon de la ĉieloj, en tiun kiu estas nomata paradizo. Estas la ununura fojo en kiu aperas la vorto paradizo en la evangelioj. La vorto ‘paradizo’ estas vorto kiu devenas de Irano kaj signifas ‘parko, bieno, granda ĝardeno’ kaj aperas nur tri fojojn en la Nova Testamento. Jesuo evitas paroli pri paradizo, li parolas ĉiam pri vivo kiu daŭras, pri resurekto, sed ĉi tie al tiu homo agonianta kun li li ne povas doni lecionon pri katekismo kaj parolas al li laŭ la vortoj kiujn tiu homas povas kompreni. “Vi estos kun mi en Paradizo”.

Nu la pordoj de la paradizo restos, ekde nun, malfermaj por ĉiuj kiuj rekonas Jesuon kiel reĝon, kiu ajn estis ilia pasinteco. Tiu estas la bona novaĵo de Jesuo.